

TRIA RENDEVUO DIDAKTIKA

kun Claude kaj Andrée GACOND :

3. La didaktiko de la bunteco

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 91-003-A-3, 1990.12.27

Cl.- Svisa Radio Internacia invitas vin hodiaŭ al tria rendezuo didaktika kun gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND.

A.- La du pasintajn semajnojn vi proponis aron da vort-kreivaj ekzercoj farendaj dum enkonduka kurso. Viaj afiŝoj proponas vortkunmetaĵojn ofte uzatajn en esperanto, kiuj ne ĉiam ekzistas en la naciaj lingvoj. Eĉ tutkomencantoj tre facile divenas la ekzaktan signifon de tiuj vortoj kaj serĉas kun intereso ekvivalentojn en la propra lingvo. Ili do faras traduk-ekzercojn. Sed mi scias, ke vi ĝenerale malfavoras la pertradukan instruadon de esperanto. Ĉu ne estas kontraŭdiro?

Cl.- Viaj rimarkoj kaj demando estas esencaj. Ili ebligas al mi pritrakti tre gravan punkton. La pertraduka instruado iras de la nacia lingvo al esperanto. Ĝin ĝenerale karakterizas vortlistoj ambaŭlingvaj, kiuj pretigas al la kompreno de teksto esperantlingva pensita nacilingve ĝenerale tradukebla kaj tradukota nacilingven. En konkludaj taskoj plej ofte troviĝas tradukoj al kaj el esperanto. Tiu tre klasika didaktiko tendencas elimini el esperanto ĉion, kio tro distanciĝas de la koncerna nacia lingvo, tio por faciligi la pertradukan laboron. La granda malavantaĝo de tiu metodo estas, kiel mi jam diris, ke la instruatoj restas forte ligitaj al la gepatra lingvo, ke ili ne troviĝas en lingvaj situacioj, kiuj emancipigas ilin el la gepatra pensmaniero.

A.- Vi celas aliajn situaciojn.

Cl.- Jes, ekde la unua kontakto kun esperanto la instruatoj renkontiĝu kun vortoj kaj tre baldaŭ ankaŭ kun frazoj, kies signifon ili tuj komprenu, sen la helpo de enkondukaj tradukrimedoj.

A.- Tial vin helpas bone elektitaj bildoj.

Cl.- Bone elektita bildo ŝparas multajn klarigojn. La bildoj estas speco de universala skribo. En la didaktiko, kiun mi proponas, traduko de esperanto al la nacia lingvo ne estas necesa. Ĝin mi proponas al la kursanoj, nur kiam ĝi helpas al prilingvaj konsideroj, kiujn ni ne povus fari sen traduko. Cetere, kiam formiĝas grupoj laŭ la etnaj lingvoj por trovi nacilingvajn ekvivalentojn al la vortkunmetoj proponitaj de la afiŝoj, plej ofte mi ne kapablas korekti la decidojn pro nescio de la koncernaj lingvoj. Cetere, tuj kiam oni havas strukturŝanĝajn ekzercojn, oni ne plu povas traduki nacilingven la formulojn, kiujn ili generas.

A.- Ni parolu pri tiuj strukturŝanĝaj ekzercoj.

Cl.- Unuan strukturŝanĝan ekzercon enkondukis la kvara afiŝo.

A.- Jes, tiu kun kapoj de bestoj.

Cl.- Antaŭ ol prezenti aliajn strukturŝanĝajn ekzercojn, mi ŝatus plene ekspluati la afiŝon kun la kapoj, por montri, ke tre simplaj situacioj ebligas generi abundon da samsignifaj frazoj. Ni devas kutimigi la lernantojn al tiu abundo, al tiu bunteco. La donita ekzemplo koncernis kapon de ĉevalo. Rememorigu ĝin parolante pri la ŝafo.

A.- **Jen kapo de ŝafo. Jen kapo ŝafa. Jen ŝafa kapo. Jen ŝafokapo. Jen ŝafkapo.**

Cl.- Tradukmetoda lernolibro por franclingvanoj tendencus doni nur la formulon **Jen kapo de azeno, jen kapo de hundo.**

A.- Kaj lernolibro por germanlingvanoj: **Jen hundokapo** aŭ eĉ **Jen hundkapo.**

Cl.- La strukturŝanĝaj ekzercoj ebligas kvazaŭajn tradukojn interne de la lingvo mem. Nova afiŝo proponas novajn ekvivalentojn:

A.- **Jen kapo de abelo. Tio estas kapo de abelo. La bildo montras kapon de abelo.**

Cl.- Kombinante la antaŭajn ekzemplojn ni ricevas abundon da formuloj.

A.- Mi provu diri ĉiujn: **Jen kapo de abelo. Jen kapo abela. Jen abela kapo. Jen abelokapo. Jen abelkapo. Tio estas kapo de abelo. Tio estas kapo abela. Tio estas abela kapo. Tio estas abelokapo. Tio estas abelkapo. La bildo montras kapon de abelo. La bildo montras kapon abelan. La bildo montras abelan kapon. La bildo montras abelokapon. La bildo montras abelkapon.** Ni havas 15 formulojn.

Cl.- Ludo estas proponebla. Iu montras bildon kaj ĉiu diru formulon ĝis nun ne diritan. Ludante kun la abelkapo ni povus ricevi pli ol 15 dirojn, ĉar iu certe imagos la frazon **Abelkapon montras la bildo** kaj alia **Abelkapon la bildo montras**. Entute do almenaŭ 25 formulojn ni facile akirus. Esperanto-komencantoj ŝatas tiajn ludojn.

A.- Neimagebla produktiveco.

Cl.- La strukturŝanĝa didaktiko emas instrui nocion en ties bunteco. Certe alvenis la momento bunte diri al la lernantoj, ke ni parolas en esperanto. Jen ĉikoncerne nova afiŝo:

A.- **Ni parolas esperanton. Ni parolas en esperanto. Ni parolas esperante.**

Cl.- Bona instruanto ankaŭ ekzercigos la formojn **Esperanton ni parolas. En esperanto ni parolas. Esperante ni parolas.** Jam almenaŭ 6 formulojn ni havas.

A.- Aliajn ni povus trovi. Ekzemple **Ni parolas esperantlingve.**

Cl.- Avenis tutcerte la momento informiĝi pri la lingvoj de la partoprenantoj. Formante kun ili specon de internacia konferenco kun interpretistoj, ni havas ludan okazon redirigi simplan respondon diversmaniere: en lingvo sen akuzativa indikilo, en lingvo sen prepozicioj, en lingvo sen la e-finaĵo, en lingvo sen la a-finaĵo. **Ĉu vi parolas la francan lingvon?** senakuzativigaĵas dirante **Ĉu vi parolas en la franca lingvo?** aŭ **Ĉu vi parolas franclingve?** aŭ eĉ pli simple: **Ĉu vi parolas france?**

A.- Tiuj strukturŝanĝaj ekzercoj ĵongligas la lernantojn kun la gramatiko.

Cl.- Tute prave, kaj ekde la unua leciono. Alia avantaĝo: Ili pretigas al stilaj ekzercoj.

A.- Kaj certe konkursoj eblas.

Cl.- Ekzemple la simpla frazo **Karlo fermas la pordon de la ĉambro** estas direbla almenaŭ per 30 formuloj. Kiu trovos la plej grandan nombron da ili?

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Se tiu rendezuo didaktika kun Claude kaj Andrée GACOND vin interesis, vi povas skribi, por peti fotokopion de tiu disaŭdigo. Ni memorigas la adreson: Svisa Radio Internacia, CH-3000 BERN 15, Svislando. Ĝis reaŭdo !

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), novembro 2012*